



CONCORDE

Organe culturel
Trimestriel

Direktoro :
Hubert FERÉZ

NICA STELO

Abonprezo : 5 F
Subtenabono : 10 F
Tél. : 84.19.07

Vers une culture, une civilisation supérieures, dans la justice, la paix,
la concorde entre les individus comme entre les peuples.

7, Avenue de Reims
C. C. Postal TOULOUSE 632.15
NICE (Francujo)

- B R A V O A L A F R A N C E -

Pour sa mission possible de Paix et d'Entente entre les Peuples

Chacun connaît Pierre DELAIRE, infatigable pionnier de la langue mondiale, auteur de plusieurs ouvrages réputés, parmi lesquels le plus récent est "LA DOLCA FRANCLANDO" (La Douce France) qu'il serait souhaitable de voir dans la bibliothèque de chaque espérantiste. Notre ami Delaire en a fait hommage à de hautes personnalités dont les réponses (en Janvier 1972) constituent un magnifique témoignage en faveur de l'Esperanto et de notre action pour l'usage généralisé de cette langue dont la pratique, comme langue seconde, améliorera profondément les rapports entre tous les humains.

Voici ces réponses, dignes du plus haut intérêt :

De M. le Président de la République -

Monsieur le Directeur,

Vous avez fait parvenir à Monsieur le Président de la République, l'exemplaire numéro 1 de l'ouvrage en Esperanto sur "La Douce France" que vous venez de publier.

Sensible à cet hommage, le Chef de l'Etat m'a chargé de vous en exprimer ses remerciements.

Je vous prie de croire, Monsieur le Directeur, à l'assurance de mes meilleurs sentiments.

Signé G. CHASSEGUET

De M. Alain POHER, Président du Sénat -

Cher Monsieur,

J'ai été sensible à l'envoi que vous m'avez fait du livre que vous venez d'éditer en esperanto.

C'est un louable effort que vous faites en vue d'une meilleure compréhension entre les peuples et c'est avec beaucoup d'intérêt que je l'ai parcouru, mesurant ainsi les possibilités qui s'offrent à ceux qui, mettant de côté les susceptibilités nationales, veulent vraiment, en les dépassant, ne voir qu'une plus grande facilité de dialogue avec autrui.

Avec mes très vifs remerciements, pour votre aimable courtoisie, je vous prie d'agréer, Cher Monsieur, l'expression de mes sentiments bien cordiaux.

Signé : Alain POHER

De M. Achille PERETTI, Président de l'Assemblée Nationale -

Cher Monsieur,

Je vous remercie bien vivement du beau livre dédié que vous m'avez envoyé. Vous avez accompli un travail intéressant pour faire connaître notre pays et je vous félicite de votre initiative.

J'approuve d'autant plus votre oeuvre que, dès mon plus jeune âge, j'ai été partisan d'un langage international unique, empruntant ses éléments aux langues les plus répandues.

En vous souhaitant un plein succès dans votre belle entreprise, je vous prie de croire, Cher Monsieur, à l'assurance de mes sentiments les plus distingués.

Signé : Achille PERRETTE

De M. Jacques CHABAN-DELMAS , Premier Ministre

Monsieur le Directeur,

Vous avez bien voulu me faire parvenir ce si intéressant ouvrage "La Douce France" rédigé en Esperanto.

Je vous sais gré de cet envoi qui va me permettre de prendre contact avec cette langue à laquelle vous assignez le plus noble des objectifs et je vous en remercie très vivement.

Dans l'espoir qu'un jour tous les hommes pourront se comprendre réellement et, par conséquent, en finir avec les conflits, je vous prie, Monsieur le Directeur, de croire à l'assurance de mes meilleurs sentiments.

Signé : Jacques CHABAN-DELMAS

De Monsieur Olivier GUICHARD, Ministre de l'Education Nationale

Monsieur,

Vous avez bien voulu m'envoyer un exemplaire de votre livre intitulé : "La Douce France".

J'ai été très sensible à cette aimable attention. Je suis persuadé que cette publication constituera un précieux témoignage pour tous ceux qui, dans le monde, s'intéressent à la diffusion de l'Esperanto.

En vous remerciant, je vous prie d'agréer, Monsieur, l'expression de mes sentiments distingués.

Signé : Olivier GUICHARD

De M. Joseph COMITI, Secrétaire d'Etat auprès du Premier Ministre,
Chargé de la Jeunesse, des Sports et des Loisirs.

Cher Monsieur,

J'ai bien reçu votre ouvrage "La Douce France" et vous en remercie.

L'esperanto représente une grande espérance pour l'humanité. La vieille malédiction qui date de la Tour de Babel pèse encore sur nous et tout ce qui peut permettre aux hommes de se comprendre leur permettra aussi de mieux s'aimer.

Je vous prie de croire, Cher Monsieur, à l'assurance de mes sentiments les meilleurs.

Signé : Joseph COMITI

LE LIBAN
s'adresse aux Espérantistes

BEYROUTH - Malgré les conditions difficiles que connaît le Moyen-Orient, le Gouvernement libanais développe activement l'industrie touristique de son pays.

Comme effort le plus récent en ce domaine, le Ministère du Tourisme a décidé de vigoureusement s'intéresser aux touristes de plus en plus nombreux parlant l'Esperanto.

Le LIBAN éditera des prospectus dans la langue universelle et l'enseignera à ses guides. Il invitera les espérantistes à faire du Liban le siège d'un de leurs Congrès mondiaux.

NOTRE POINT DE VUE - Tous les hommes et toutes les femmes qui partout travaillent à amener une réconciliation entre les peuples, à exalter la fraternité, à nourrir les sentiments d'interdépendance et de solidarité, et qui ne voient aucune barrière entre les Nations, les religions et les races, sont les bâtisseurs de notre Idéal.

EN ESPERANTO - LANDO

(30) ARLES - Pli ol 120 gesamideanoj renkontiĝis en Vokluza fonto la 4 an de Junio elvenintaj el Solliès-Pont, Gap, Marseille, Aix, Arles, Privat, Crest, Mazan, Marbonne, Montpellier, Avignon, la Grand'Combe, Nîmes, Alès, Inter ili, 40 junaj geknaboj el la Esp. kursoj de Solliès-Pont, gvidataj se Sro MATHIS kaj deko de gejunuloj lernantoj de F-ino FAUCHER aŭ S-ino MOURRE (Gap) kaj S-ino VOLPELIERE (Nîmes).

Komuna manĝo okazis ĉe la junulargastejo. Bonŝance la plimulto el partoprenantoj piknikis, ĉar la manĝoĉambro estis plenplena. Eĉ kelkaj ne antaŭe enskribitaj devis iri en la restoracion.

Post la tagmanĝo, RAYNAUD dankis al la ĉeestantoj. LENTAIGNE donis interesajn informojn kaj sub la gvidado de Sro GENTE, ĉiuj gaje kantadis. Je la 15a, grupope babilante, la samideanoj sin direktis al la mondfama fonto.

Tiu renkonto ebligis al esperantistoj el 9 sudfrancaj departementoj troviĝi aŭ interkonatiĝi en agrabla kaj frateca etoso.

ARLES - 13 - CAMP INTERNATIONAL DES LOISIRS DANS LES CEVENNES -

Un moyen de passer d'agréables vacances et de rendre service ! - C.I.L. est le sigle des camps organisés par l'Association des Loisirs Educatifs animés par Monsieur et Madame Jean GAUTHIER.

Depuis plusieurs années, un C.I.L. fonctionne en Andorre et des centaines de jeunes et adultes de différentes nationalités ont pu mieux connaître la Co-Principauté, grâce à l'organisation du C.I.L.

Le camp "La Cevenne" est constitué par un terrain sur lequel est située une vieille ruine que l'Association voudrait remonter pour en faire un centre de rencontre de jeunes et de moins jeunes.

Il s'agit de trouver des groupes de jeunes, ou même individuellement des personnes qui accepteraient de participer à la restauration (construire un bloc sanitaire, aménager des terrains de jeux, etc...) en séjournant durant les vacances sous forme de camp dans ce beau site des Cévennes.

En échange de cette participation des uns et des autres aux "petits chantiers" les membres de l'Association feront profiter de leur connaissance de la région pour aider à "découvrir" les Cévennes.

L'Association fait donc appel à des groupes de jeunes bénévoles ou même des familles qui voudraient bien participer à ce chantier ce n'est pas nouveau, mais ce qui diffère de beaucoup d'autres chantiers et en vaut la peine, c'est un genre d'action qu'acquiert celui qui a participé à cette réalisation.

Renseignez-vous donc à : "Les Amis des Jeunes", 11, rue Langevin - 13 - ARLES.

G A P - 05 - La pasintan jaron, ni organizis 4 kursojn por 20 lernantoj de la knaba liceo. Kelkaj el tiuj kursoj estis "skeletaj" kaj tiu fakto fiaskigis la tutan aferon.

Tial nunjare ni decidis aranĝi la aferon laŭ alia metodo. Estis ja tre malfacile kolekti sufiĉe da lernantinoj, ĉar ni agadis en la knabina liceo, por ke la kursoj estu iom pli vizitataj. Ni ricevis 38 enskribojn. Sed pro diversaj horaroj ni povis malförmi 3 kursojn nur por 23 lernantinoj. Ĉiuj kursoj duon-semajnaj donis bonajn rezultatojn, kaj la 22an de marto - antaŭ la Paska ferio - 11 knabinoj trapasis la "Ateston pri lernado". Dek sukcesis kvankam la nivelo estis iom pli alta ol tiu fiksita de la Franca Esperanto-Instituto.

La 24 an de majo, reprezentantino de la urba magistrato disdonis la diplomojn al la dek laŭreatinoj en ĉeesto de la Direktorino de la liceo. La Sekretario de la Grupo donacis la franclingvan verkon "Le Docteur Esperanto" al la helpurbestrino kaj al la Direktorino, dum F-ino Faucher, S-ro Thierry kaj S-ro Colney, ĉiuj membroj de la grupo pinglis la verdstelan insignon sur la bruston de la knabinoj

Gis la venonta lernojaro por starigo de perfektiga kurso !

Listo de la laùreatinoj : Fraùlinoj :

| | |
|----------------------------------|---------------------------------------|
| ASTIER Eliane, de le BERSAC (05) | BARRE Marie José, MONETIER-les-B (05) |
| BRESSON Odette, ANCELLE (05) | CASSIN Martine, BRIANCON (05) |
| DUVAL Andrée, MARSEILLE (14°) | GRASSO Hélène, EYGUIANS (05) |
| GUEIT Michelle, GAP (05) | RAYNAUD Chantal, SERRES (05) |
| ROUX Huguette, GAP (05) | PONS Claire, BRIANCON (05) |

Roger COLNEY

G R A Y - 70 - Kunlabore kun la loka Esperanto-Amikaro, la Turisma Servo de Gray ĵus eldonis grandan urbomapon kun informoj pri Gray, en franca lingvo kaj Esperanto. Por ricevi ĝin senpage, skribi al S.I. 8 rue Victor Hugo - 70 - GRAY.

N I C E - 06 - Foliumante malnovan revuon, "L'Esperantiste", decembre 1901, mi legis ke agema kaj distinginda membro de E-Grupo de Parizo, Sro Horace HUET, profitis sian restadon en Nice por fari en la klubo "L'Artistique", paroladon, kiu havis plenan sukceson. La parolanto, kiu estis samtempe praktika organizanto, memoris ke oni devas "forĝi dum la fero estas varma", li tuj rikoltis la aliĝojn, kaj alportis al la Société pour la propagation de l'Esperanto kiel novjara donacon, ĉarman Grupon, kiu ne estis la plej malgranda ornamo por la tiama Jarlibro. La Vie Mondaine, l'Eclaireur de Nice kaj aliaj Nicaj gazetoj afable donis eĥon al la parolo tiel efike Esperantista de S-ro Huet.

- Povus esti ke la membroj de la malnova Esperanto Grupo de Nice, starigita dum la jaro 1901a, estu malmultenombraj nuntempe, sed la hodiaŭaj grupanoj certe havos plezuron per la memorigo de tiu malproksima fariĝo kaj, kiu scias ? eble ili konsideros organizi feston okaze de proksima datreveno de la starigo ?

L. VANNINI.

NANCY - 54 - Esperantistaj vojaĝantoj en Orienta Francujo povas tranokti (sen aĝolimo) en la moderna Junular-hejmo, kiu ĵus malfermiĝis en Nancy. Konfortaj ĉambroj (kun 1,2,3 aŭ 4 litoj) kaj manĝoj je moderaj prezoj. Por informoj kaj rezervado, skribu al la Direktoro, MJC, 27 rue de la République, 54. NANCY - Por kontakto kun lokaj esperantistoj, skribu al S-ro J.P. COLNOT - 15, rue de Lavaux à 54 - LAXOU.

SOLLIES - PONT - 83 - La 23an de aprilo, okazis la familia festo de la "Amicale des Parents d'Elèves des Cours d'Esperanto du canton de Solliès-Pont. Tiu grandioza festo - grandparte realigo de Gesinjoroj A. MATHIS - disvolviĝis antaŭ pli ol 300 spektantoj. La regionaj gazetoj publikigis ege laŭdajn raportojn kaj multajn fotojn pri la festo mem sed ankaŭ pri la Esp.kursoj Tiun belan kunvenegon ĉeestis F-ino Marako Iŝihava el Tokio, tre konata esperantistino, same kiel la gelernejestroj de l'kantono. Gajega etoso, kiel kutime ! - Miajn gratulojn al gesinjoroj A. MATHIS !

Cette grande fête du 23 Avril réunissait un grand nombre de familles des nombreux élèves des Cours d'Esperanto du Canton de Solliès-Pont ; elle fut une manifestation d'enthousiasme et de reconnaissance envers tous ceux - professeurs, maires des différentes communes et M. le Sénateur BALESTRA, artisans de l'oeuvre éducative magnifique accomplie dans le canton. ! Ce canton est un exemple pour tous ceux - élus et autres - qui veulent, dans leur région, former une jeunesse, saine d'esprit et de coeur, et qui pourra se consacrer à l'élaboration progressive d'une société meilleure, plus rationnelle, plus juste, plus humaine ! H.F.

PERPIGNAN - 66 - Ĉi-tie regiona filatela ekspozicio estis aranĝata la 18,19 kaj 20an de marto 1972 en la kadro de la tutlanda "tago de la poŝtmarko". S-ro Jean AMOUROUX, fakdelegito de la U.E.A. pri Esperanto-filatelaĵoj, prezentis 4 panelojn kies temo estis "ESPERANTO en POLLANDO". Dum 3 tagoj la ekspozicio estis konstante vizitata, ankaŭ multaj hispanoj venis.

La vizitantoj kaj ĵurio voĉdonis por elekti la plej meritplenan kolekton. La Esperanto-kolekto ricevis la duan premion kun bronza medalo. La regiona gazetaro plurfoje raportis kaj eĉ la interdepartementa televido prezentis, grandplane, la foton de ZAMENHOF, kiu ornamis la centron de unu el la paneloj.

PRI NIA FEDERACIO : Spite de neebleco por aranĝi kunvenojn, la federacio, de la rivero "Rhône" ĝis la montaro "Purénées" bone agis dum la jaro 1971 en ĉiuj medioj. La federacia komitato regule kunvenas kaj ekzamenas ĉiujn problemojn por efike propagandi.

La jara federacia kongreso 1971 okazis en Nîmes sub la prezido de René Llech-Walter. Festparolis D-ro Albault. La urbestro ĉestis kaj Inspektoro Cachon parolis pri la kultura valoro de la internacia lingvo.

La federacia Kongreso 1972 okazis la 19an de Marto en BALARUC-les-BAINS.

STRASBOURG - 67 - De post la 14a de Marto estas elektita nova prezidanto aŭ pli ĝuste prezidantino. Samtempe ni havas la plezuron anonci la reekaperon de S-ro BARIDO kiel vicprezidanto kaj profesoro. Dank'al li, la grupo ricevis novan impulson. Li ekkomencis pliperfektigan kurson de kiu ni ĉiuj profitas. La kunvenoj kvankam tre seriozaj, agrable estas miksitaj je bonhumero kaj la fiksita tempo de la daŭro rapide, ofte tro rapide forpasas.

Ĉar la nuna sidejo estas tro malvasta, s-ro Barido proponis al ni renkontiĝi en la lernejo, kiun li estras. La kunveno okazos estonte la unuan kaj la trian mardon en : Ecole d'application du Conseil des XV - Cité Rotterdam. La dua kaj la kvara mardo estas ĉiam ankoraŭ rezervitaj por la kunveno en la sidejo : Place Mérian N° 1.

B. GRAMPP.

TOULON - 83 - FUNEBRO - Kun konsterno kaj grandega doloro, ni eksciis pri la tragika evento, kiu trafis la familion JURQUET, el Toulon kaj el Marseille : la forpaso de nia kara Samideano André JURQUET, C.P.E. en la Liceo Dumont Durville, mortinta la 17 an de Julio 1972.

Ĉiuj geamikoj, ĉu esperantistaj, ĉu ne, de Gesinjoroj JURQUET profunde kompatas kun la doloro de Sinjorino Camille JURQUET, ankaŭ tre sindonema kaj lertega esperantistino, kaj tre afliktite ŝin kaj tutan familion kondolencas.

El nome de ĉiuj "CONCORDE"

- PRI OKCITANIO -

Ĉiujare en Avignon okazas Festivalo kie oni prezentas teatraĵojn, filmojn, pentraĵojn ktp. Pasintjare la okcitanoj volis profiti de la amaso da vizitantoj por organizi Okcitanan Festivalon. Ĉiuvespere, oni prezentis teatraĵojn en okcitana lingvo, ĉiu posttagmeze okazis prelegoj kun debatoj kie ĉiu povis paroli ; dum la tuta tago, la publiko povis viziti la ekspozicion de la libroj kaj diskoj en la okcitanaj dialektoj kaj konstati la gravecon de la eldonoj.

Ni tie renkontis delegitojn de transalpa Okcitana Movado kaj tiel sciis ke en Italio ekzistas vigla organizo : Aŭtonomista Okcitana Movado kiu sukcesis konkeri urbestaron en vilaĝego de la province Cuneo kun pli ol 65 % da voĉoj.

Ili postulas konforme al artikolo 6 de la konstitucio de la Itala Respubliko la rajton por sia propra kulturo kaj la rajton al aŭtonomio kiel la Valdotanoj kiuj parolas france.

Kiel oni vidas, la nacieco ne koincidas ĉiam kun la ŝtataj Landlimoj kaj en la morgaŭa Eŭropo, oni devos eviti la kunfandiĝon de imperialismoj ŝtatoj, oni devos starigi la grandajn regionojn kie ĉiu etnio havos sian propran lingvon apud la dua lingvo por ĉiuj : ESPERANTO.

L. PELLETIER

PRI OKCITANIO (Suite)

P.S. - La Esperantistoj de U F E kaj de SATamikaro povus interkonsenti por ankaŭ profiti la Festivalon de Avignon organizante "Verdan Festivalon" ; oni ja kapablas prezenti teatraĵon, filmojn, prelegojn kun debatoj kaj aranĝi ekspozicion por montri la librojn kaj revuojn de la tuta mondo.

L. P.

"PENSER C'EST VIVRE": PAR L'ESPERANTO LA PENSEE DEVIENT UNIVERSELLE !

Tel est le slogan qui se trouve sur la carte de membre de l'Association Culturelle du Château de Gresillon, à côté du dessin stylisé du Château.

Vous pouvez recevoir cette carte en virant 5 frs. au C.C.P. ASSOCIATION CULTURELLE DU CHATEAU DE GRESILLON n° 2.512.77 - NANTES. Cette Association groupe "Les Amis de l'Esperanto" et "Les amis de Grésillon", c'est-à-dire aussi bien les espérantistes chevronnés que des sympathisants de la langue internationale Adhérez et faites adhérer vos amis, vous contribuerez ainsi au maintien de la merveilleuse création du regretté MICARD, ce haut lieu de la culture espérantiste qu'est le Château de Grésillon.

- RENATO -

LIBERA TRIBUNO

ARTIKOLO de D-ro PACEMO

Mallonga disertaĵo pri la kialoj de malĝojeco, enuo kaj postulo de seĝeneĉo de la junularo (sekvo de N° 32)

.....

Tiam almenaŭ oni parolas pri maltrankvileco, pri korpremo, tre ofte pri deprimado. Sciencistoj konsultitaj konfesas sian elreviĝon, sian malkontentecon malgraŭ brilegaj rezultoj de siaj eltrovoj.

Kial tiu manko de ĝojo, kiun ĉiu observanto substrekas kiel proprecon de nia materialisma civilizo, fakte tiel komforta nur por parto de la homaro ?

El studentaro ne eliĝas tiom tiu senseco de ĝojo, kiu estis ĉiam rekonata al la junularo kiel ĝia propraĵo neniam kontestita. Sed la studentoj enuas en universitataj domoj. Prof. Thuillier el Nanterre certigas : " mi dirus prefere ke Nanterre's etoso estas malĝoja, simple ĉar ne estas plus loko, kie blovas spirito. - la studentoj enuas."

Ĝojo kaj scienco, ĝojo por scienco ne estas neakordigeblaĵoj : gravas ke instruado estu ĉirkaŭvolvata de ĝojo. Oni tiel malpravas similigante seriozaĵon, gravaĵon kaj tediaĵon ! Ke ne estu forpelita, forigita, el nia nuntempa vivado, la ĝojo de l'intelektulo, kiu instruas, de la scienculo, kiu esploras, de la menso, kiu lernas, ke oni ekinterprenu klopodojn por la homa ĝojo kaj depostulu niajn neŝanĝeblajn, iomete forgesitajn rajtojn por ĝojo ! Multaj aspektoj de vivado estas malvigilaj. Sed ni povas pliagrabligi ĉion tinn, se ni efektive deziras. Pli kaj pli ni posedas ne ĉiun tagon gajkapablon !

(Sekvo en la venonta numero)

S A R A D O J

I.- Mia unua estas prefikso
Ne tre uzata. Sur mia dua
Ni ĉiuj vivas kaj mia tuto
Estas afero nekomprenebla.

2.- Konjunkcio, jen mia unua.
Vi povas skribi per mia dua
Sed mian tuton neniam skribu
En la oreton, ĉe ne ĝin diru.

LEA ESPITALIER

L'Espéranto dans les Etats Baltes

L'Espéranto est officiellement introduit dans les Ecoles des trois Républiques baltes. Après la Lithuanie et l'Estonie, la Lettonie vient d'introduire l'enseignement de l'Esperanto dans toutes les Ecoles où se trouvent des enseignants capables d'enseigner la langue.

TUTMONDA KULTURO

Usona antropologistino, Margaret Mead, estas la unua virino, kiu ricevas la "Premion KALINGA pri scienca vulgarigigo". Kiam M. MAHEU ĝenerala Direktoro de UNESCO, donis al ŝi tiun premion, Margaret MEAD deklaris ke la homaro devas celi tutmondan kulturon, nepre necesa por certa postvivo de la homoj.

Inter la rimedoj, kiujn ŝi rekomendegas, troviĝas : "la starigo de komuna parolata lingvo, bazata sur natura lingvo, kiun ĉiuj popoloj uzus kiel duan lingvon, sed konservante sian patran lingvon."

Koncerne nin, esperantistoj, ni ja scias ke nia helplingvo, bazata sur naturaj indo-eŭropaj lingvoj, enhavas ĉiuj kvalitojn por disvastigi tiun tutmondan kulturon.

M. CLAIR - TOULON.-

SURPRIZO POR NIAJ SAMCELANOJ, KIUJ SATAS KANTI !

L A V O J O

Poezio de L.L.Zamenhof

Muziko de A.B.Maliszewski

Tempo de marŝario kun konvinko

flankigante,
 Nur rekte kura-ĝe, kaj ne ni i-ru la vojon celi-tan! (Eĉ)
 Eĉ gute malgranda monton konstante frapante trabo-ras la gra-ni-tan. (L'Es kaj per kies
 L'Espero, l'obstino la pacienco jen estas la signoj potenco, (Ni)
 post lon-ga laboro, celon en glo-ro. (Ni)
 Ni, pa-ŝo paŝo post a-tingos la
 Ni, pa-ŝo post post lon-ga labo-ro a-tin-gos pa-ŝo, la ce-lon en glo-ro. (L'Es
 en glo-ro.
 a-tin-gos la celon

KORESPONDI DEZIRAS : I.- Fraŭlino Mariko Ono 17 jara. 8-7 Kitahama cho KURASHIKI urbo, Okayama (Japanio). Deziras Korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj postkartojn. 2.- Fraŭlino Anna Němcová - Kosetin, Nová 1229 okr. Prerov, Ĉekoslovakio. Deziras korespondi kun juna esperantistino por plu scii pri Franclando.

EL LA GAZETARO - ESPERANTO" (Revuo de UEA.- Marto 1972) "Esencaj demandoj"
(Ivo Lapenna)

Estas ĉiam embarase disigi unu alineon el ĝia ĝenerala kunteksto precipe, kiam la artikolo estas subskribita de Ivo Lapenna, Prezidanto de UEA , kaj ke ĉi tiu artikolo enhavas kvin kolonojn. Tamen ni eltiras el la artikolo le jenan ĉapitron : "Pragmatismo kaj ideeco lokita sub la referenco de la fama frazo de Zamenhof : "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni devas havi nenion komunan !" :

" Cetere, la preciza senco de pragmatismo estas nenio alia ol "rigardi
" la faktojn nur el la vidpunkto de la ilia praktika valoro (P.I.V)
" Se pragmatismo por iu unuavice signifas eblecon ricevi turisman
" informon aŭ legi menuon en Esperanto - kio ja estas utila - por
" alia ĝi povas unuavice signifi la eblecon legi bonan originalaĵon,
" aŭ literaturan tradukon, aŭ fakan verkon en la Internacia Lingvo.
" Ankaŭ propagandado de siaj individuaj aŭ unuopaj parti-politikaj,
" religiaj aŭ sociaj idealoj estas fakte pragmatismo en tiu ĉi senco.
" Kial ne utiligi Esperanton ankaŭ por tiuj celoj, kondiĉe, tamen, ke
" en UEA mem ni observu ĝian neŭtralecon ? Kiel reklamado de industria
" produkto devus signifi praktikan utiligon, dum prezentado de sociaj,
" politikaj aŭ religiaj konceptoj devus malhavi tiun karakteron ?
" Ni estu pli largmensaj en la konceptado de la ampleksega rolo de
" Esperanto ankaŭ el pure pragmatismo vidpunkto"

LE MONDE - (franca ĉiutaga ĵurnalo). (7 avril 1972). "Les Espérantistes comptent sur le Marché Commun."

Nantes.- L'union française pour l'Espéranto, qui a réuni son 64ème
" Congrès à Nantes, a décidé de lancer une campagne pour "attirer
" l'attention des Associations de parents d'élèves, des mouvements
" de jeunesse et des syndicats d'enseignants sur les avantages de la
" langue. L'élargissement de la Communauté Européenne, affirme une
" résolution adoptée à la fin du Congrès, posera à plus ou moins longu
" échéance, le problème du choix du moyen de communications," et l'Es-
" péranto pour ses partisans, présente des avantages incontestables
" par rapport à une langue nationale, quelle qu'elle soit. Le premier
" objectif des Esperantistes est d'obtenir que la langue qu'ils pra-
" tiquent puisse faire l'objet d'épreuves facultatives aux examens.
" Bien que l'enseignement de l'Espéranto relève actuellement d'ini-
" tiatives individuelles dans les écoles primaires, les collèges ou
" les Lycées publics, les Maisons de jeunes et les associations cul-
" turelles, le nombre des élèves a augmenté sensiblement."

La malsamopinioj kaj malfacilaĵoj, estigitaj de la nocio de supernacieco , kiu en la eŭropa kadro ŝokas la saĝan dignon de kelkaj Instancoj, estas senaj je pravo de ekzistenco tiam, kiam temas pri Esperanto, lingvo internacia. Esperanto estas la tute taŭginda lingvo ĝuste elfarita-oni povas aserti - almezurit laŭ postuloj kaj laŭ la efikkampo de la Eŭropa Komunumo. Sed la E.K. estas ankaŭ la bonŝanco de Esperanto . Ambaŭ estas faritaj por la bonkompreno, bonmastrumado kaj bela rangaltigo de la Unuiĝinta Eŭropo.

R. CERISIER

45 a SAT KONGRESO EN FINLANDO, 22-28 JULIO 1972

Somera semajno tre taŭgas por kongreso ĉi-tie ! Longeco de la taglumo ebligas, ke oni enmetas facile en la ĉiutagan programon laboron kaj distron. Suno brilas de la 4-a vespere. Cetere la bona organizo ankaŭ faciligas aktivecon de la kongre-
sanaro : pli ol 300 anoj el proksimume 20 landoj Tiun admirindan organizon oni suldas al kelkaj kuraĝaj kaj sindonemaj esperantistoj de Kuopio kaj al subteno

de la regionaj kaj urbaj instancoj. La kongreso ricevis senpage la urban teatron por la inaŭgura kunveno kaj tutan lernejon por la semajna laboro kaj por la loĝado de multaj gekongresanoj. Apuda restoracio malfermita nur al kongresanoj evitas tempoperdon. Regiona gazeto : SAVON SANOMAT, aperigis ĉiutage resumon de la mondaj informoj en Esperanto.

Pri la laboro de la kongreso oni legos en revuoj de SAT. Sed kiu diros pri la plezuroj : ĉiutage pluraj aŭtobusoj transportas la kongresanojn al nova ravanta loko; kie ili ĝuas sunon, arbaron, lagon, tute libere sin banante, rikoltante berojn, "saŭnante", aŭ simple dormante sur la varma sablo aŭ sub ombro de betuloj kaj pinoj.

La distraĵoj organizitaj en la kongresejo ricevis plenan sukceson : la interkonatiĝa vespero en Ritionemi, la arta vespero, kiu finiĝis per bela teatraĵo de C. DRAGUN, tradukita en Esperanto kaj majstre ludita de la junulara sekcio de la urba teatro. Tiu teatraĵo montras koncize sed trafe la kompatindan sorton de senlaborulo. Ĝia titolo : Viro, kiu ŝanĝiĝis en hundon, estas je elokventa ! la teatra vespero de studenta esperanta klubo, drama sekcio, de Zagreb, kiu prezentas unuaktaĵon de M. TWAINE, C. Kiskon kaj Petrov. La stranda vespero kun radio-amatoroj, kiuj dissendis kantojn en Esp. kaj en diversaj aliaj lingvoj.

Ne dubeble ke ankaŭ la adiaŭa vespero kontentigos ĉiun.

Post la kongreso la kongresanoj iros parte al Norda Kabo, aliparte al Leningrado, sed ĉiukaze, ili certe ne forgesos urbon Kuopio kaj ties rimarkindajn kulturajn kaj sociajn realigaĵojn, precipe la belegan teatron kaj la vastan bibliotekon moderne ekipitan, kiujn oni ŝatus havi en francaj urboj..... Post tia kongreso oni povas konsili al la francaj esperantistoj ke ili konatiĝu kun Finnoj, kaj somerumu ĉi-tie.

TURIN

Kuopio, 26-an de Julio 1972

=====

LA INFORMILO

de la ORIENT-FRANCA ESPERANTO FEDERACIO

Sidejo : FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE

27 rue de la République, 54000, NANCY.-

Bonvolu sendi viajn tekstojn por la proksima numero de "CONCORDE", antaŭ la 10-a de Oktobro 1972, al S-ro André Grossmann, Bât. D2, rue de la Doller, 68110 ILLZACH;

Cerbumu !

Nun alvenis la ferioj. Mia agado por Esperanto kvietigis. Bona epoko por ĉesi labori, kaj por cerbumi. Cerbumu de tempo al tempo. Ne tro, ĉar tio estus laciga ! Revu pri via estonta agado, pri viaj estontaj atingoj por Esperanto ! Kiel vi scias, Esperanto ne venkos per si mem, sen lukto de siaj aktivuloj. Dum la pasint-jaraj ferioj, mi revis pri mia estonta agado. Inter aliaj, mi imagis la aferon, kiu plej ĉerpis el mia energio dum tuta trimestro, kaj kiu estas perfekta elzemplo de tio, kion oni ne faru : enketo per demandiloj tro long-tekstaj. La publiko abomenas legi kaj respondi tiajn aferojn. Tamen tio ne estis tute senfrukta : en Nancy kreiĝis nova kerno de novaj lernantoj.

Kio estos mia, kio estos nia estonta agado en Nancy ?

Mi ankoraŭ ne scias ; sed mi certe cerbumos pri tio, ĉefe dum mia restado en Primošteno, komence de aŭgusto.

Ni bezonas kursojn : en Strasbourg, en Mulhouse, en Epinal, en Bar-le-Duc, en Guebwiller, en Thann, en Colmar, en Vittel, en Metz, en Bruyères, en Lunéville, en Château-Salins, kaj kompreneble en Nancy. Ĉie, kie estas samideanoj, kapablaj gvidi kursojn, kursoj devas okazi. Inter la membraro de nia Federacio, mi nombris 17 personoj kapablajn gvidi kurson. Por krei kurson, oni bezonas ne nur kurs-gvidanton, sed ankaŭ lernantojn. Lernantojn oni kreas per bona informado, ĉefe per personaj kontaktoj. Prepari kaj gvidi nur unu kurson ne estas afero super homaj fortoj.

Pri tio, mi invitas vin cerbumi dum la estontaj semajnoj.

La Prezidanto.

Raporto de la delegito de la Federacio dum la nacia kongreso en Nantes

Kiel oficiala delegito de la oriente federacio dum la 64-a nacia kongreso de Esperanto en Nantes, mi legis, dum la 2-a ĝenerala kunveno, kiu okazis dimanĉon posttagmeze 2-an de aprilo, la raporton pri nia Orientfranca Esperanto-kongreso (kiu okazis en Strasbourg la 26-an de marto 1972-an) redaktitan de nia Prezidanto S-ro COLNOT.

Post diversaj aproboj de la agada kaj financa raporto kaj de la ĝenerala gvidlinio de la estraro de la U.F.E. venis la rezervoj ricevi klarigojn pri la plendoj (percirkulera kampanjo) de S-roj ROUGETET kaj LLECH-WALTER.

Kvankam mi estis la lasta el la federaciaj parolantoj, mi estis la unua kiu levis tiun tiklan aferon kaj tio estis kaŭzo de tre vigla kaj pli ol unuhora diskutado, kelkfoje akra.

La prezidante Dro ALBAULT donis la parolon al S-ro ROUGETET kiu detale donis sian vidpunkton kaj, ĉar S-ro LLECH-WALTER ne partoprenis la kongreson, la Prezidante legis preparitan respondon rilate al la 2 plendintoj kaj plie al S-ro RIBOT.

Resume, aperis ke por la 3 diversaj aferoj, estis sama kaŭzo kaj komuna respondo : la 3 malkontentuloj agis kontraŭ decidoj de la estraro kaj, ĉar la estraro estas respondeca antaŭ la konsilio kaj ĝenerala asembleo ĝi rajtas nuligi tion kion ĝi pli frue decidis (kazoj LLECH-WALTER kaj RIBOT) aŭ ne repagi tuj ŝulditan sumon ne antaŭviditan en la jara buĝeto, sed nur kiam tiu sumo estos enskribita en la buĝeto.

Jean CHAPPELLIER

Nia Federacia Kongreso.-

Nia venonta Federacia Kongreso, en 1973, okazos en NANCY.

La Centra Junul-domo ne nur akceptas, sed tre deziras esti la kongresejo. Ĝi deziras ne nur, ke oni organizu kongreson, sed ke tiu kongreso estu impona kaj, se eble, estu ligita kun plur-taga renkontiĝo.

Mi proponas, ke la Federacia Kongreso okazu dimanĉe, 3 aŭ 4 semajnojn antaŭ Pentekosto (tio estos : la 13-an aŭ 20-an de majo). Renkontiĝo povus okazi ek de sabato. Tranoktado kaj manĝoj eblas en la Junuldomo mem. (Tarifo por 1 persono : Tranoktado en komforta privata ĉambro : 12,50 F. - en 2 aŭ 3 litaj ĉambroj : 11,50 aŭ 12,00 F. Matenmanĝo : 1,50 F - Tag - kaj vespermanĝo : 6,00 F).

Mi petas ĉiujn grupo - kaj kurs-gvidantojn enketi apud siaj membroj kaj lernantoj, por scii, kiom da personoj certe partoprenus 1 - sabate kaj dimanĉe - 2 nur dimanĉe. Laŭ la respondoj, ni organizos, (aŭ ne) renkontiĝon kaj kongreson imponan (aŭ ne). Krome, mi petas, ke kunlaborantoj bonvolu anonci sin por gvidado de kulturaj aŭ amuzaj aranĝoj.

Ĉiu leganto de ĉi-tiuj linioj sentu sin koncernata kaj nepre respondu dum oktobro. Izoluloj ankaŭ anoncu sin !

J.P. COLNOT

NANCY - Parolaj kursoj : La 2 kursoj finiĝis meze de majo kun, entute,
 ===== 5 gelernantoj.

Kunvenoj : Ek de la fino de la kursoj, cirkuleroj estis dissendataj al 25 personoj
 por informi pri rekomenciĝo de kunvenoj.

Dek personoj entute respondis favore; Okazis 5 kunvenoj kun, ĉiufoje, 6 ĝis 8
 partoprenantoj.

Ekzameno : La jenaj personoj sukcesis en la ekzameno kaj ricevis la diplomon
 "Atesto pri unua-gradan lernado" : S-ro Daniel BARBAROSSA, Laxy -
 S-ro Gilbert COLLIN, Nancy (kun cito : tre bone) - S-ro A.F. GALEAZZI, Nancy -
 F-ino Martine MORET, Laxou - S-ro Bruno MAURY, Nancy - Gratulojn al ĉiuj !

Koresponda kurso : De Oktobro ĝis fino de junio, ni dissendis 44 artikolojn al
 la gazetaro, respondis pri 127 informpetoj kaj enskribis 42 gelernantojn.

En la nuna lerno-jaro, la jenaj personoj finis la unua-gradan kurson :
 S-ro GALEAZZI (Nancy) (post du-monata lernado) kaj S-ro KLOTZ (Nancy) (post 3-monata
 lernado) ambaŭ gviditaj de S-ro CHAPPELLIER (Jarville). S-ino ARLEN (Château-Salins, 57)
 gvidita de S-ino JACQUOT (Epinal). S-ro BERTHET (Saint Dizier-52) kaj F-ino PFLUG
 (Froeschwiller-67) ambaŭ gviditaj de S-ro ZIPPEL (Strasbourg). S-ino LARROQUE
 (Troyon-55) gvidita de S-ro DENIS (Bar le Duc)

Finis la superan kurson : S-ro BOIVIN (Dole 39) post 13 monata lernado - kaj S-ro
 GALEAZZI (Nancy) post apenaŭ 7 monata lernado. Ambaŭ superajn lernantojn gvidis
 S-ro BERGEROT (Epinal)

Gratulojn al ĉiuj kuraĝaj lernantoj kaj sindonemaj instruantoj !

EPINAL - La parola Kurso, gvidita fare de S-ro BERGEROT kaj F-ino JACQUOT
 ===== finiĝis kun 10 gelernantoj - Bonega rezulto !

-o-o-o-o-o-

Projektoj - Ekspozicio kaj Kursoj

La ĉefaj aktivuloj en nia Federacio ricevis cirkuleron de nia samideano P. DENIS,
 proponantan la ekspozicion aranĝitan de S-ro LENTAIGNE, kiu prezentas al la publiko
 100 plej interesajn Esperanto-librojn. La ekspozicio estos prezentata en Bar le
 Duc, komence de oktobro, kaj en Nancy ĉirkaŭ la 15-a de la sama monato - prepare
 al la vintraj kursoj. Espereble, ĉiu aktivulo mendos ĝin por prezentado en sia urbo.

En Bar-le-Duc, S-ro P. DENIS aranĝos la aferon en la kadro de nova asocio "Kultura-
 Agado", kiu ankaŭ patronos la organizon de nova kurso.

En Epinal, S-ro BERGEROT planas novan unua-gradan kurson kaj dua-gradan kurson.

En Nancy, ni planas denove funkciigi la 2 ĉi-jarajn parolajn kursojn, en la Centra
 Junul-domo kaj en la Socia Centro Beauregard.

Krome, S-ro GALEAZZI petis permeson malfermi publikan kurson en lernejo de sia
 kvartalo. Li prelegis pri Esperanto dum kunveno de anoj de la "Honora Legio" kaj
 de meritintoj de "Akademiaj Palmoj", en kvartala Junul-domo kaj en por- instruista
 seminario.

Se ni havas sufiĉe da kurs-gvidantoj, ni povus disponi pri deko da ĉambroj por
 organizi kursojn.

GEEDZIGO -

Nia samideano Claudine CROISE, ĝis nun en Brin-sur Saille (54)
 edziniĝis la 29an de aprilo kun S-ro Jacky BUISSON. Ŝi loĝas nun en Nancy.
 Al la novaj geedzoj, gratulojn kaj bondezirojn !

IOM DA SERCO

Eksperimento - Sinjorino luas aŭtomobilon (taksio). Si dira al la kondukisto : - Mi petas, ni iru malrapide, mi vojaĝas aŭtomobile por la unua fojo - Ne timu, respondas li. Estas la unua fojo, ke mi kondukas tra Parizo

La trafa solvo - Du najbaroj kune babilas :
- Nu, vi tro multe fumis. Ĉu vi legis, kion ili skribis sur la gazeto, lastsemajne, koncerne la malsanojn kaŭzitajn de la tabako ? ?.....
- Jes, mi legis.
- Nu ?
--De tiam, mi ne plus legas la gazetojn.

G. COULON.

FRANDEMULA ANGULO - (Kroniko de G. PARIZOT) -

Kuniklaĵo kun citrono

Tranĉu kuniklon en pecojn. Brunigu tiujn pecojn en fergisa kaserolo kun iom da oleo kaj kelkaj larderoj. Priverŝu ilin per malgrasa buljono. Salu, pipru, almetu malgrandajn cepojn kaj aromatikajn, spic-herbojn. Kovru kaj kuiru je malintensa fajro.

Post duonhoro, eltiru la pecojn kaj tapiŝu la fundon de la kaserolo per rondpecoj de citrono sufiĉe dikaj ; remetu supren la pecojn de kuniklaĵo : almetu la sukcon de duoncitranoj.

Kuiru ankoraŭ malrapide dum duonhoro, senmovi, por ke la tranĉaĵoj de citrono restu nedifektitaj.

Antaŭ ol surtabligi, se tro maldensa estas la saŭco, densigu ĝin per iom da faruno.

Presentu la kuniklaĵon sur plado, aranĝante la rondpecojn de citrono sur ĉiun peccon de kuniklaĵo kaj priverŝu la saŭcon de la kuirado.

POUR L'ETUDE DE L'ESPÉRANTO

- 1.- Etude complète en 22 leçons.
- 2.- Aucun livre à acheter : le matériel d'étude est fourni.
- 3.- Réception gratuite du périodique culturel "CONCORDE"
- 4.- Invitation personnelle à nos Fêtes, rencontres, congrès etc...
- 5.- Attribution gratuite de correspondants (es) à l'étranger.
- 6.- Attribution d'un diplôme de Fin d'Etudes
- 7.- Enseignement et correction des

devoirs : GRATUITS. Seuls frais contribution unique de 20 Frs - (pour frais d'impression des cours édition de Concorde, invitations, etc) à verser au Président du Comité : H. FEREZ, 7, Av. de Reims, 06100 -NICE C.C.P. TOULOUSE 632.15.

Dans ce cadre :
Votre adresse ou celle du
GROUPE LOCAL

GEEDZIGO - Kun feliĉo, ni anoncas la geedziĝon de niaj geamikoj Christine WALLE kun Michel CAVELAN. Niajn gratulojn kaj bondeziron !